
Prezo: 7 €
www.satesperanto.org
Januaro-februaro-marto 2024 n-ro 01-03 (1423-1425)

# Sennaciulo

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA



SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

# Kotizoj Perantoj kolofono

## 2024

| | |
|---|---|
| Argentino | 8 € |
| Aŭstralio | 48 € |
| Aŭstrio | 48 € |
| Barato | 4 € |
| Belgio | 48 € |
| Bosnio-Hercegovino | 8 € |
| Brazilo | 16 € |
| Britio | 48 € |
| Bulgario | 8 € |
| Ĉeĥio | 24 € |
| Ĉinio | 12 € |
| Danio | 48 € |
| Estonio | 16 € |
| Finnlando | 48 € |
| Francio | 48 € |
| Germanio | 48 € |
| Grekio | 8 € |
| Haitio | 4 € |
| Hispanio | 36 € |
| Hungario | 16 € |
| Irano | 8 € |
| Irlando | 48 € |
| Islando | 36 € |
| Israelo | 36 € |
| Italio | 44 € |
| Japanio | 48 € |
| Kanado | 48 € |
| Kolombio | 8 € |
| Kongo, DR | 4 € |
| Koreio | 36 € |
| Kostariko | 12 € |
| Kroatio | 16 € |
| Kubo | 4 € |
| Latvio | 12 € |
| Litovio | 12 € |
| Luksemburgio | 48 € |
| Madagaskaro | 4 € |
| Makedonio | 8 € |
| Malio | 4 € |
| Meksiko | 12 € |
| Mongolio | 4 € |
| Nederlando | 48 € |
| Nepalo | 4 € |
| Norvegio | 48 € |
| Pollando | 16 € |
| Portugalio | 24 € |
| Rumanio | 12 € |
| Rusio | 12 € |
| Serbio | 8 € |
| Slovakio | 16 € |
| Slovenio | 16 € |
| Svedio | 48 € |
| Svisio | 48 € |
| Tajvano | 32 € |
| Turkio | 12 € |
| Ukrainio | 4 € |

**dumviva membreco 1300 €**

**Aŭstralio**
Franciska Toubale
1 Marne Road
Mount Evelyn
Victoria 3796
Aŭstralio
rete : fran14_ĉe_bigpondnetau

**Belgio**
Claude Glady
Rue du Culot, 1
BE-5630 Cerfontaine
Belgio
Tel-Fakso-Respondilo : +32 (0)71 644916
Rete : cglady_ĉe_arcadisbe
Bankkonto : 750-6373051-18
IBAN : BE 50 750-6373051-18
SWIFT/BIC : AXABBE22

**Bosnio-Hercegovino**
Fetah Zvirac
Esada Pašalića 6
71000 Sarajevo
Bosnio-Hercegovino
rete : fetahzvirac_ĉe_gmailcom
tel (poŝa) : +387 (0)61 170 094

**Brazilo**
Fernando Pita,
Estrada Coronel Vieira, 134, Bl 03 Ap 402, Bairro Irajá
BR-21220-310 Rio de Janeiro
rete : magisterpita_ĉe_gmailcom
tel : +55 21 98863-3854

**Britio**
Arturo Prent
7 Walton Gardens
Hutton, Brentwood
Essex CM13 1EJ
Britio
tel : +44 1 277 22 89 62
rete : ap_esp-sat21_ĉe_yahoocouk
Nomo : «SAT SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA»
Bank-kodo : 09 01 56
Kont-n-ro : 57604003
IBAN : GB62ABBY09015657604003
SWIFT/BIC : ABBYGB2LXXX
Averto 1 : Se vi uzas Bank-kodo plus kont-n-ro kaj mistajpas, la bank-sistemo ne kontrolas la nomon, kaj la pago povos atingi malĝustan konton
Averto 2 : Kont-eltiroj venas nur tri-monate Nepre sendu retmesaĝon kiam vi sendas la pagon
Se vi malbonŝancas, eble estas longa paŭzo ĝis eblas konfirmi vian pagon

**Bulgario**
Metodi Markov
Vasil Levski, 20
BG-2700 Blagoevgrad
Bulgario
tel (fiksa) : +359 73882791
tel (poŝa) : +359 879040403
rete : mam1948_ĉe_abvbg
IBAN : BG98FINV915010BGN030E5
SWIFT/BIC : FINVBGSF

**Ĉinio**
HENRY Bruno
rete : esperantobhenry_ĉe_yahoofr
WeChat : Bruno57240
Kotizojn pagu al la konto de SAT ĉe PayPal : financoj_ĉe_satesperantoorg aŭ al konto de SAT ĉe UEA : satx-s

**Francio**
Barthélémy Maurau
Appartement 120
3 allée Nathalie SARRAUTE
FR-27000 EVREUX
Francio
rete : barthelemymaurau_ĉe_freefr

**Germanio**
Gary Mickle
Brüsseler Straße 6
DE-13353 Berlin
Germanio
rete : gmickle_ĉe_nexgode

**Hispanio**
PARRA-BENITO Luis-Manuel (Manolo)
C/ALPUJARRAS 24, BAJO B
ES-28032 MADRID
_+34 913 01 48 44
manoloparra@yahooes
IBAN : ES9001821294180202776277
Banko BBVA

**Hungario**
PETIK Janos
Hársfa u 31 I/7
HU-3104 Salgótarján
Hungario
rete : kitepsonaj_ĉe_gmailcom

**Italio**
Nicola Ruggiero
Corso Palermo 12
IT-10152 TORINO (TO)
Italio
rete : nicolaruggiero1986_ĉe_gmailcom
IBAN : IT05Z0347501605CC0011648125
SWIFT/BIC : INGBITD1

**Izraelio**
Jehoŝua Tilleman
97-A Dereh-Akko
IL-26373 Kirjat-Mockin
Izraelio
rete : b48705544_ĉe_013net

**Japanio**
Nakamura Daiŝin
Shinagawaku Yashio
5-6-39-1006
JP-140-0003 Tokyo
Japanio
rete : sat-peranto-japana_ĉe_googlegroupscom
Poŝtkonto : 00980-9-37624 SAT-Nihon

**Katalunlingvio**
Sandra Vives - KEA
Apartat 1008
ES-08200 Sabadell
Hispanio
Tel : +34 93 716 36 33
rete : sandra_ĉe_esperantocat

**Koreio**
Jung Hyunsoo (Paz)
4014-2202, 156, Gwangyomaeul-ro
Yeongtong-gu
KR-16510 Suwon-si, Gyeonggi-do
Koreio
rete : paze23_ĉe_gmailcom

**Kroatio**
Ivica Ŝĉepanoviĉ (Truto)-poŝte
HR-21414 Gornji Humac (Otok Brac)
Kroatio
Tel : +385 21647059
Poŝtel : +385 0981827907
rete : ivicascepanovic1_ĉe_stt-comhr
Bankkonto : 3105505351 otpbanka
IBAN : HR51 2407 0003 1055 0535 1
SWIFT/BIC : OTPVHR2X

**Litovio**
Gražina Opulskienė
Obuoliuko 42
LT89213 Mažeikiai
Litovio
Tel : +370 68736457
rete : grazopul_ĉe_yahoocom
Bankkonto : LT347300010001720030
SWIFT/BIC : HABALT22, Swedbank

**Madagaskaro**
Henriel Fidilalao-Firaisana
Lot Iag 27 B Antoetra
MG-102 Ambohidrapeto
Madagaskaro
Tel : +261 33 11 268 36
rete : fidilalao@yahoofr
Banko : BVF Societe Generale
00007 Tsarallana
IBAN : MG46000080000705001000024 103
SWIFT/BIC : BFAVMGMG

**Norvegio**
Cécile Anda
Esperantoveien, LI
NO-4320 Hommersak
Norvegio
rete : cmranda_ĉe_frisurfno

**Pollando**
SŁOWIŃSKI Grzegorz (36213)
Przemysłowa 4/181,
PL- 31-046 KRAKOW,
Pollando
rete : gjslowinski_ĉe_gmailcom
Tel : +48 600 944 734

**Portugalio**
PAZ Alexandra kaj PRIETO Roger
JOAQUIM ANTONIO DE AGUIAR 100, 1°
PT- 4000-309 PORTO
Portugalio
rete : alexandrapaz_ĉe_gmailcom kaj rogerprieto_ĉe_gmailcom
Tel :+351 916 793 285 / +351 915 067 954
Banko : Caixa Geral de Depósitos
Konto : 0748007271900
IBAN : PT50003507480000727190049
BIC/SWIFT : CGDIPTPL

**Rusio**
Nikolao Gudskov
a/k 57
RU-105318 Moskvo
Rusio
rete : nikolao_ĉe_yandexru

**Serbio**
Vakas

**Svedio**
Inga Johanson
Stampgatan 60B-1202
SE-411 01 Gotenburgo
Svedio
rete : ishim_ĉe_hotmailcom aŭ ingajohansson50_ĉe_gmailcom
Poŝtkonto : Svenska arbetaresperantoförbundet, n-ro 5 31 60-8
IBAN : SE75 9500 0099 6026 0053 1608
SWIFT/BIC : NDEASESS

**Svisio**
Dieter Rooke
Interlakenstr 122A
CH-3705 Faulensee
Svisio
rete : dieterrooke_ĉe_vtxmailch
tel : +41 62 396 01 86

**Ukrainio**
Andreo JANKOVSKIJ
str Lajosha Havro 11-B, ap 68
UA-04211 KIJV
Ukrainio
rete : andreoespero_ĉe_gmailcom
telefone : +380 67 99 470 03

**Ĉiuj landoj**
SAT-Sidejo
67 av Gambetta
FR - 75020 Paris
Francio
Tel : (+33) 09 53 50 99 58
rete (ĝenerala retadreso) : kontakto_ĉe_satesperantoorg
rete (pri financaĵoj) : financoj_ĉe_satesperantoorg
Poŝtkonto : 1234 22 K, La Banque Postale, Paris
IBAN : FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
SWIFT/BIC : PSSTFRPPPAR
eblas pagi ankaŭ al la konto de SAT ĉe UEA : satx-s
aŭ al la konto de SAT ĉe PayPal : financoj_ĉe_satesperantoorg

**SAT**
Siège de SAT / Asocia sidejo de SAT :67 avenue Gambetta, FR-75020 Paris, Francio
Retadreso: kontakto@satesperantoorg
Retejo: http://satesperantoorg
Tel: (+33) 09 53 50 99 58
Poŝtkonto: 1234-22 K, Paris
IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA: satx-s
Konto de SAT ĉe PayPal: financoj@satesperantoorg

Pri financaj aferoj sendu al: financoj@satesperantoorg
Libromendojn sendu al: libroservo@sat-amikaroorg
Librajn eldonproponojn sendu al: eldonkoop@satesperantoorg

**Plenum-Komitato**
Prezidanto: **Vinko Markovo**
Vic-prezidanto: **Pedro Sanz**
Sekretario: **Brandon Sowers**
Kasisto: **Bruno Henry**
Vic-kasisto: **Alexandra Paz**
Ceteraj membroj: **Saioa Escobar, Paz (Jung Hyunsoo), Dominiko Simeone**
Reprezantoj de SAT en la LEA-Komitato: **Saioa Escobar, Paz**

**Sennaciulo**
Organe officiel de SAT / Oficiala organo de SAT

Redaktoskipa kunordiganto: **Vinko Markovo**
Enpaĝigantoj: **Serĝo Sir'**
**h**elpanto **Marcelo Redulez**
Ceteraj redaktantoj: **José Antonio del Barrio, Djémil Kessous, Gary Mickle, Rob Moerbeek, Grazina Opulskiene, Richard Schneller kaj Franciska Toubale**

Imprimé par/Presita de: Ulzama Digital, Pol Ind Areta, C/ Altzutzate, 51
31620 Huarte (Navarra), Espagne
Aperas po 6 numeroj jare (dumonate / bimestriel), minimume po kvar (trimonate/trimestriel)
Abonnement annuel/jara abono: France 36 €
Autres pays/aliaj landoj: petu la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-centro

Dépot légal à la date de parution

N° CPPAP 05 25 G 86567
N°ISSN:1163-0442

# Redaktangulo

Karaj legantoj,

Jen la unua numero de la jarkolekto 2024, denove 28-paĝa kaj trimonata. En ĝi vi trovos diversstilajn kontribuaĵojn pri nunaj aktualaĵoj kaj pri temoj pripensindaj laŭ pli longtempa perspektivo. Apud kutimaj kunlaborantoj, dankindaj pro ilia persistemo, notinde aperas ĉi-foje nova subskribo. Ĉu ankaŭ vi venontfoje sendos ion ?

Pro la perturboj en la aperritmo de Sennaciulo, ne aperis Sennacieca Revuo kun la jarkolekto 2023. Tamen la revuo ne estas forgesita, kaj materialo estas prilaborata cele al aperigo en 2024.

Kun tiu ĉi numero estas dissendita papera aliĝilo por la kongreso en Oporto. Jam aliĝis kvardeko da kamaradoj, kaj vi estas bonvena pliampleksigi la grupon kaj proponi programerojn.

Fine, ne forgesu voĉdoni por elekti la ontajn membrojn de la Plenum-Komitato kaj Ĝenerala Konsilantaro. Ĉar la ekspedo de la pasinta numero, kiu enhavis la paperan referendumilon, estis prokrastita ĝis la mezo de majo, necesis denove forŝovi la limdaton por la balotado, ĉi-foje ĝis la fino de junio.

Agrablan kaj agad-instigan legadon deziras al vi

La redaktoskipo

**Frontpaĝa bildo, el «Manifesto kontraŭ laboro» p.10**

# Enhavo


**Tra la mondo : Azio**
04 - Forĵeto de nuklee poluita akvo...

**Tra la mondo : Mezoriento**
06 - Rojavo nuntempe sub...
07 - Israelo–palestino milito

**Tra la mondo : Eŭropo**
08 - AfD profitis la okazon
09 - Voĉoj de senvoĉuloj
10 - Manifesto kontraŭ laboro
12 - Substitua naciismo :...
17 - Francis Galton
18 - La ekstremdekstro vivas el...

**El la SAT-administrado**
19 - Plu pri Oporto-kongreso
19 - Novaj membroj

**Opinioj - Reagoj**
20 - La militgajnantoj
21 - Alies historio
22 - Ŝafisto de homoj
23 - Faŝistaj ŝafistoj for !

**Beletro**
24 - Hispana somero
26 - Se ne mi faras, kiu faros ?
28 - Limpolicistoj



**Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem**
Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas
Kontribuojn sendu elektronike al:
sennaciuloredaktejo@gmailcom
aŭ paperpoŝte al: SAT-Amikaro, 132-134 boulevard Vincent Auriol,FR-75013 Paris, Francio

# Forĵeto de nuklee poluita akvo en la maron

La 24-an de Oktobro 2023, Elektra Kompanio Tokio (TEPCO) komencis forĵeti nuklee poluitan akvon en la maron el la nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima, kiu estis detruita de la cunamo de la 11-a de Marto 2011 kaj nuntempe estas malkonstruata.


**Kial poluita akvo akumuliĝas?**

Ĉe la nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima, akvo daŭre estas verŝita en reaktorojn 1-3 por malvarmigi la nuklean fuelon, kiu fandiĝis kaj falis malsupren sur la fundojn. Tiu malvarmiga akvo estas kolektata kaj reuzata, sed pluvakvo kaj grundakvo fluas en la difektitajn konstruaĵojn, kreante 100 tunojn da poluita akvo ĉiutage. Por malhelpi ĝian pliiĝon, pluvakvo kaj grundakvo estas kolektata antaŭ ol ili enfluas, krome konstruaĵoj estas ĉirkaŭitaj de frostigitaj termuroj, sed 100 tunoj da poluita akvo daŭre naskiĝas, kaj ekzistas neniu perspektivo redukti tiun kvanton al nulo.



Poluita akvo estas stokata en grandaj cisternoj. Antaŭ la stokado, radioaktivaj materialoj estas forigataj per la sistemo nomata ALPS, kiu forigas la plej multajn el la 62 specoj de radioaktivaj materialoj, kiel ekzemple cezio kaj stroncio, sed ne forigas tricion, kiu havas trajtojn similajn al akvo.

Nun estas stokitaj 1 340 000 tunojn da poluita akvo en la tereno de tiu centralo. La registaro kaj TEPCO diras, ke la tereno estas jam preskaŭ plena de tiuj cisternoj kaj tio malhelpas efikan laboron de la malkonstruado de la reaktoroj.




**Mensoguloj promesas**

La registaro provas refunkciigi pli multajn reaktorojn en Japanio, por kio ĝi dissendadas falsajn informojn al la popolanoj, ekzemple «la akcidento estas jam solvita», «multaj popolanoj ĝenerale aprobas la forĵeton de la poluita akvo», «tricio ne estas danĝera», «la forĵeto estis aprobita de IAEA *(International Atomic Energy Agency*, Internacia Atom-energia Agentejo)», «la loko mankas por plu teni la poluitan akvon» ktp., sed ĉiuj tiuj estas falsaj informoj laŭ mi.

Unua mensogo kaj trompo estas, ke en 2015 TEPCO kaj la registaro promesis al la fiŝkaptista asocio de Fukuŝima, ke ili faru nenion pri la poluita akvo sen kompreno de la koncernatoj. Sed la registaro trude decidis forĵeton de la poluita akvo sen sufiĉa kompreno de la fiŝkaptistoj.

Dum la pasintaj pli ol 10 jaroj la fiŝistoj kaj terkulturistoj en Fukuŝima suferadis, ĉar multaj homoj timas manĝi produktaĵojn de Fukuŝima pro la radioaktiveco. La gubernio Fukuŝima mezuris radioaktivecon en la produktaĵoj kaj informis, ke la kvanto de radioaktiveco en ili estas tre malmulta komapre kun la normo aŭ preskaŭ ne ekzistas. Kiam tiu timo estas pli kaj pli forviŝita, forĵeto de la poluita akvo donas denovan baton al tiuj produktantoj.

Krome la forĵetado daŭros 50 jarojn kaj pli. Al la malkontenta estraro de la fiŝkaptista asocio, la ĉefministro promesis, ke la registaro faru necesajn rimedojn por la eblaj problemoj tiel longe kiel 50 jaroj, sed ridindege! Neniu kredas, ke tiuj mensoguloj, kiuj facile rompis la promeson kun la fiŝista asocio, plenumos tian promeson dum la venontaj 50 jaroj. Krome en la nuna monda situacio neniu povas imagi, kio okazos dum tiuj multaj jaroj.

La decido de la registaro batos ne nur la fiŝistojn de Fukuŝima, sed ankaŭ ĉiujn fiŝistojn kaj fiŝaĵindustrion en Japanio, ĉar Ĉinio, kiu estas la plej granda importanto de japanaj mar- kaj terproduktaĵoj, rifuzas importi tiujn. Se ne ekzistas aĉetantoj, tiuj fiŝistoj kaj terkulturistoj suferegas multe. Eĉ se la registaro preparos buĝeton por kompensi tiujn perdojn, tio ne estos solvo. Fiŝkaptistoj estas ĝojaj, kiam la konsumantoj ĝoje manĝas iliajn fiŝojn. Eĉ se ili ricevos multan kompensan monon, tio ne donas ĝojon, nek feliĉon al ili. Antaŭ la decido la registaro diris, ke la forĵetado estas la plej malmultekosta rimedo, sed se ĝi devos kompensi pli ol 50 jarojn, tio estos pli

multekosta ol la aliaj rimedoj. Krome Japanio devos vivi ĉirkaŭate de la kritiko de najbaraj landoj, perdinte ilian fidon. Tiu perdo ne estas videbla, sed certe la bildo de Japanio kiel fidinda lando perdiĝos.

**Mensogoj de la mensoguloj**

Por pravigi la forĵetadon de la poluita akvo, la registaro argumentas jene:

1. La forĵetita akvo ne estas danĝera, ĉar ĝi estas multe diluita, kaj tion IAEA aprobis.

Sed IAEA estas asocio, kiu subtenas la atomenergipolitikon, kaj por ĝi Japanio multe donas monon (8,32% de la buĝeto de IAEA), sekvante Usonon (25,25%) kaj Ĉinion (11,15%). Ĝi ne estas neŭtrala organizo. Ĝia analizo ne estas 100-procente ĝusta.

2. Tricio ne estas danĝera por la homa korpo, ĉar ĝi estas preskaŭ sama kiel akvo.

Sed tricio estas radioaktivaĵo, kaj oni ne scias precize, kion kaŭzos la enkorpa tricio.

3. En multaj landoj oni elĵetas akvon kun tricio el siaj atomreaktoroj, kaj la kvanto de tricio tiel elĵetita estas pli multe ol tiu forĵetota de TEPCO.

Sed eĉ se oni diluos la poluitan akvon, la forĵetota kvanto ne malpliiĝos. Kioma kvanto da poluita akvo, sekve kioma kvanto da tricio estos forĵetitaj dum la venontaj 50 jaroj?

La aliaj landoj ja forĵetas trician akvon, sed tio mem estas ne rekomendebla kaj ne permesebla afero. Ĉu Japanio senhonte sekvos aliajn landojn, kiuj faras malbonon al la medio?

La akvo forĵetata de la nuklea centralo de Fukuŝima estas el la detruitaj reaktoroj, ne normale «poluita» akvo el normale funkciantaj reaktoroj. Krome en la akvo el Fukuŝima plu restas aliaj specoj de radioaktiveco, ekzemple stroncio 90, unu el la plej danĝeraj specoj, cezio 134 kaj 137, jodo 129, karbono 14 ktp., kiuj preskaŭ eterne restos en la maro.

4. La tereno en la nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima jam estas plena de la poluita akvo kaj tio malhelpos la malmuntadon de la detruitaj reaktoroj.

Sed troviĝas tereno por stoki la poluitan akvon ĉirakaŭ la nuklea centralo n-ro 1, kaj tion eĉ la registaro konstatis en 2020. Krome iuj lokanoj estas pretaj pruntedoni siajn neuzeblajn kampojn jam poluitajn de la akcidento en 2011 al TEPCO, sed tiu ne aŭskultis ilin.

TEPCO diras, ke por la laboro elpreni fandiĝintan radioaktivaĵon, ĝi bezonas sufiĉan spacon, sed ĝis nun ĝi neniom elprenis, kvankam jam 12 jaroj pasis post la akcidento. Oni ne scias, kiam ĝi sukcesos elpreni eĉ iomete da fandiĝinta radioaktivaĵo.

**Pro la forĵeto nur TEPCO profitas**

Fiŝkaptistoj kaj terkulturistoj ne profitos el la forĵeto de la poluita akvo, sed suferegos. La japanoj ne profitos, sed devos timi, ke ili manĝos poluitajn fiŝaĵojn kaj terkulturaĵojn. La japana registaro ne profitos, sed elspezos grandan kvanton da kompensa mono al fiŝistoj kaj terkulturistoj. Ĉinoj ne profitos, sed devos rezigni gustumi bongustajn japanajn produktaĵojn. Landoj ĉirkaŭ Japanio timos, ke ankaŭ iliaj fiŝoj estos poluitaj kaj ne estos manĝeblaj. La mondo timas, ke la maro estos poluita kaj la medio estos difektita. Profitas nur TEPCO. Kvankam estas alia rimedo trakti kaj stoki la poluitan akvon, kial la registaro decidis la forĵeton? Certe koruptitaj politikistoj, ricevinte multe da ŝmirmono de TEPCO, puŝis la ĉefministron.

**Japanio devas esti deca lando**

Kontraŭ la forĵeto de la poluita akvo, Ĉinio multe protestis kaj deklaris la importomalpermeson de japanaj produktaĵoj. Nun la rilato inter ambaŭ landoj ne estas bona, kaj dekstruloj diras, ke Ĉinio ruze uzas tiun ĉi aferon kiel efikan ilon por bati Japanion. Ja tio ne estas neadebla, sed la japana sinteno estas pli ruza kaj ne akceptebla. La ĉefministro diradis, ke li persvados Ĉinion per «sciencaj faktoj», kiujn IAEA aprobis por atesti la sekurecon de la forĵetota akvo. Al mi ŝajnas, ke li estas aroganta. En lia parolado estas kaŝita lia penso, ke Ĉinio estas malsaĝa, ne akceptinte la science pruvitajn aferojn aprobitajn de IEEA. Eĉ multaj japanoj ne akceptas tiujn «sciencajn faktojn» kiel falsaĵojn, do kiel Ĉinio naive akceptos lian persvadon?

Mi sentas honton pro lia sinteno. Forĵeti poluitan akvon en la maron mem estas malbonaĵo al la medio kaj al la mondo. Kiel deca lando, Japanio devas eviti tion. Ĝi devas klopodi kaj klopodi por solvi la problemon enlande, provonte ĉiajn rimedojn kaj eltrovonte novajn teknikojn, kaj finfine malgraŭ tiom da klopodoj, se ĝi ne povos trovi aliajn rimedojn krom forĵeti la akvon en la maron, tiam ĝi devos peti, klinante sian kapon profunde, ke la mondo akceptu la japanan decidon. Sen tiaj klopodoj, nun Japanio arogante kaj desupre frontas al la najbaraj landoj kaj provas pravigi sin, mokante tiujn pro ilia «nekompreno». Vere Japanio fariĝis hontinda lando.

*Mensoguloj mensogas pli grandajn mensogojn.*
*Ju pli granda estas mensogo, des pli efika ĝi estas.*
*Kiuj suferos pro nia malbonago, tiuj estas niaj posteuloj.*
*Malfeliĉaj estas la popolanoj regataj de mensoguloj.*
*Mensoguloj interesiĝas nur pri «nun, mi kaj mono».*

HORI Jasuo